

la verda stelo



**SEKCIO
ESPERANTO NOORD-NEDERLAND**

januaro 2018



LA VERDA STELO

eldono de

ESPERANTO

NOORD-NEDERLAND

ESPERANTO-KLUBO

POR LA PROVINCOJ

GRONINGEN, FRIESLAND KAJ

DRENTHE

prezidantino

s-ino I. Emmelkamp

Arubastraat 12

NL-9715 RW Groningen

Tel: +31(0)505 718 842

info@esperanto-info.nl

provizora sekretario

s-ino I. Emmelkamp

Arubastraat 12

NL-9715 RW Groningen

Tel: +31(0)505 718 842

info@esperanto-info.nl

kasisto

s-ro R. Hofman

Castorstraat 360

NL-9742 BZ Groningen

Tel: +31(0)6 42247155

esperanto@ziggo.nl

kontaktuloj Frislando

s-ro W. Akkerman

Westerein 41a

NL-8571 GB Harich (Frl)

Tel: +3151 460 22 72

wiebren.olaf@gmail.com

kaj

s-ro A. Hovinga

De Fennen 47

NL-8918 CC Leeuwarden

Tel: +31(0)628 916 262

andries.hovinga@tiscali.nl

Esperanto-centro

s-ro J.B. Swenker

T.W.S. Mansholtstraat 25

NL-9728 MC Groningen

Tel: +31(0)505274572

info@esperanto-info.nl

redakcio

I. Emmelkamp, R. Hofman A. Hovinga

la.verda.stelo@xs4all.nl

ttt-ejo

<http://pingveno.nl/klubo>

Enhavo

Agendo	3
Naskiĝtagoj	4
Prelego	5
Pri la Nordo	6
Petoj	14
Peter van der Velde-jaro	14
Nekrologo	15

Contributie Esperanto Noord-Nederland 2018

Afdelingslid (incl. abonnement La Verda Stelo)	€ 12,50
Gezinslid	€ 6,25
Donateur (minimaal)	€ 7,00
Abonnement La Verda Stelo	€ 7,00

Over te maken op IBAN: **NL50 INGB 0003 8224 72** t.n.v.

Esperanto Noord-Nederland te Groningen

Leden van Esperanto Noord-Nederland worden geacht lid te zijn van **Esperanto Nederland**.

Vandaar dat wij hier ook het IBAN ervan vermelden:

NL10 TRIO 0786 8441 67 t.n.v. Esperanto Nederland te Capelle aan de IJssel.

Lidmaatschap (incl. abonnement Fenikso)	€ 35,00
Gezinslid	€ 12,50

Kunveno: Dreesflat, W. Dreesstraat 1, Groningen**- ŝanĝoj rezervitaj -**

La plej freŝajn novaĵojn kaj ŝanĝojn vi trovos en nia retejo:

<http://pingveno.nl/klubo>, sub la rubriko **Aktuale**

januaro

25 19:45 Distra parolado

februaro

3 15:30 Komenco de Peter van der Velde-jaro en la biblioteko en Roden, Heerestraat 178

8 19:45 Distra parolado

22 19:45 Distra parolado

marto

8 19:45 Jarkunveno

22 19:45 Distra parolado

aprilo

5 19:45 Distra parolado

19 19:45 Distra parolado

majo

3 19:45 Distra parolado

17 18:00 Kune manĝi

junio

21 10:30 Somera renkontiĝo. Scandinavisch dorp, Oude Badweg 1, Eelderwolde

julio

26 10:30 Somera renkontiĝo. Schimmelpenninckhuys, Oosterstraat 53, Groningen

aŭgusto

23 10:30 Somera renkontiĝo. MEM talenpaviljoen en la Prinsentuin, Leeuwarden. Ni kolektiĝos en la stacidomo kaj promenas al la Prinsentuin.

Naskiĝtagoj

4	januaro	Wil	van Ganswijk-Vlasblom
27	januaro	Ineke	Emmelkamp
8	februaro	Andries	Hovinga
11	februaro	Henk	van Kappen
28	februaro	Luit	Staghouwer
24	marto	Bert	Begeman
1	aprilo	Tiny	Bulk-Beenen
6	aprilo	Petra	van Kappen-van der Kamp
7	aprilo	Ankie	van der Meer
10	aprilo	Smaranda	Tintu
5	majo	Gonda	Kruijer
7	majo	Gerard	Boer
23	majo	Frans	Schild
27	majo	Warner	Renken
24	junio	S-ro	Snoek
14	julio	Frans	Kortebein
10	aŭgusto	Nelly	Kiel
16	aŭgusto	Koos	Scharroo
27	aŭgusto	Hylke	Bron
30	aŭgusto	Johan	Swenker
3	septembro	Wiebren	Akkerman
6	septembro	Anna	Bijl-Bonder
7	septembro	Marita	Kruijswijk
17	septembro	Henny	van Hogen-Cornelissen
24	septembro	Els	van der Heij-Alblas
2	oktobro	Fien	Koopmans-Hollenga
29	oktobro	Bets	Dodebier
14	novembro	Greta	Volders
1	decembro	Richard	Hofman



Preleĝo

Ekstersunsistemaj planedoj

Dum la Zamenhofa tago, la 9-a de decembro, Frank van Hertrooij prelegis pri planedoj kiuj ĉirkaŭas aliajn stelojn ol nian sunon. La subtitolo de lia preleĝo estis "Kiel teleskopoj konfirmis sciencfikcion".

Li komencis paroli pri la planedoj kiuj ĉirkaŭiras nian sunon. La vorto planedo originas el la greka vorto signifianta vaganto. La normalaj steloj ŝajne estas fiksitaj sur ĉiela globo, tiel ke ni povas vidi konstelaciojn kiel la Granda Ursino. La planedoj vagas sur tiu ĉiela globo. Ili moviĝas sendepende de la steloj.

Kelkaj planedoj estas videblaj per la nuda okulo. Tiujn planedojn oni konas jam dum jarcentoj. Nur post la inventado de teleskopoj, oni malkovris Uranon kaj Neptunon.

Kiel ekzemplo de sciencfikcio Frank montris foton el Star Wars. Sur la foto




• *El Star Wars: du sunoj*

Luke Skywalker rigardas la sunsubiron

la du sunoj de la planedo Tatooine. Kaj vere, la astronomoj jam trovis planedon kiu havas 2 sunojn. Eĉ NASA priskribis tiun planedon kiel Tatooine-eca.

Kiam mi estis en la meza lernejo, antaŭ pli ol 40 jaroj, mi jam lernis pri metodo por malkovri ekstersunsistemajn planedojn: ruĝenŝoviĝo. Kiam stelo moviĝas al la tero, la koloro de la lumo iomete bluiĝas; kiam stelo moviĝas for de la tero, la koloro iomete ruĝiĝas. Tio estas simila al la fajfado de vaporlokomotivo. Kiam ĝi alproksimiĝas la sono estas pli alta ol



• *Ruĝenŝoviĝo*

kiam ĝi foriras.

Frank eksplikis ke per alia metodo, io pri pulsaroj, oni malkovris la unuajn ekstersunsistemajn planedojn. La plimulto de ekstersunsistemaj planedoj oni malkovras per ege simpla metodo: kiam planedo estas inter ni kaj sia propra stelo, tiu planedo iomete mallum-



• *Transito de Venuso*

igas tiun stelon. Renverse, kiam ni sur la tero rimarkas ke la lumo de iu fora stelo iomete kaj regule ŝanĝiĝas, tiam la kaŭzo povas esti eksternsistema planedo.

En la 14-a de decembro, do nur kelkajn tagojn post la prelego de Frank, NASA anoncis ke Google helpis malkovri 8-an planedon ĉirkaŭ iu fora stelo. Google ne estas nur serĉkompanio. Ili ankaŭ scias multon pri artefarita inteligenteco: kutime ili uzas tiun scion por trovi katajn filmojn en Interreto. Similan sistemon ili uzis por trovi eksternsistemajn planedojn en la abundo de datumoj, kiujn donas la NASA spaca teleskopo "Kepler".



● *Frank van Hertrooij prelegas*

Johan Swenker

Pri la Nordo

2 marto 2017

Protokolo de la klubkunveno de la 2-a de marto 2017

Partoprenis: Wil, Nelly, Johan, Richard kaj Luit.
Malanoncis sin: Ineke kaj Andries.

Luit denove kunportis plurajn malnovajn librojn kiujn li volonte adiauas. Bedaŭrinde Andries ne ĉeestis kaj la aliaj ĉeestantoj hejmenportis nur kelkajn librojn.

Wil kaj Luit kunportis frandaĵon. Wil okaze de la naskiĝ-

tago de sia filo Jaap kaj Luit okaze de sia propra naskiĝtago.

Wil veturos la venontan tagon al Bilthoven por ĉeesti kremacian ceremonion. Por Wil la itinero de la stacidomo al la kremaciejo estas konata. Ŝi jam foje iris tien, interalie pro la kremacio de sia frato.

Johan veturis al De Bilt kie okazis kunveno de membroj de komputilkluboj. Inter la partoprenantoj estis i.a. ankoraŭ ege vigla 90-jarulo. Ĉi tiu maljunulo estas profesoro Willem van der Poel, kiu en 1958 projektis unu el la plej fruaj komputiloj en Nederlando: la ZEBRA-o. ZEBRA signifas "Zeer

Eenvoudige Binaire Reken Automaat (Tre Simpla Binara Kalkul-Aparato). La ZEBRA estis ege granda aparato. Unu el la plej fruaj ZEBRA-sistemoj funkciis en la Ŝtata Universitato de Groningen.



- La ZEBRA en 1958 al Reitdiepskade en Groningen (foto: RUG)

Kiel kutime Johan entuziasme parolis pri komputiloj kaj la diversaj komputilaj lingvoj. Malgrandaj komputiloj estas preskau senpagaj nuntempe. La unua komputilo de Johan kostis proksimume tri mil guldenojn. Mirinde estas ke la rapideco de komputiloj ĉiun jaron preskaŭ duobliĝas kaj la formato malgrandiĝas. Kiom longe tio povos daŭrigi?

Wil sciigas ke “Mariana” (Marita Kruijswijk kaj Marian Nesse) en septembro prezentos dum la festo okaze de la 500-jara jubileo de la komunumo Ooststellingwerf. La komunumo situas en la sud-orienta angulo de Frislando.

Wil kunportis ludkartojn (Ludi- kaj Lernikartoj por lingvo-ekzerco) kaj ni pasigis en agrabla etoso la lastajn 20 minutojn de la kunveno.

16 marto 2017

La 16-an de marto okazis nia jarkunveno. Kiel ĉiam, ĝi ankaŭ estas normala klubvespero. Ĉi tiu raporto emfazas la klubvesperan aspekton.

Nelly forlasis la estraron post sep jaroj. En februaro 2010 ŝi transprenis la sekretarian taskon de Wil. Johan forlasis la estraron post 25 jaroj. La protokolo de la 13-a de februaro 1992 mencias, ke li fariĝis vicprezidanto. La protokolo de la 4-a de marto 1993 mencias, ke Johan transprenis la prezidantan martelon de Niza Kuiterman. En tiu tempo ni ankoraŭ havis protokolibron, en kiu ni skribis protokolon per plumo.

Nelly kaj Johan ricevis florojn pro sia laboro por la klubo. Richard, la sola estrarano kiu restis, sentis sin deviga kunporti florojn. Sed ankaŭ Wil pensis: devas esti floroj por la eksestraranoj,



kaj ŝi petis de Ineke aĉeti belajn bukedojn.

Dum la kontrolo de la kaso ĉe Richard, Ineke, Andries kaj li jam pripensis: kiuj devus esti la novaj estraranoj? Feliĉe Ineke decidis ke ŝi tiel ofte venas al la klubkunvenoj, ke ŝi tial povas esti estrarano. Dum la jarkunveno ni decidis ke Ineke estos nia prezidanto, kaj

funkcios provizore kiel sekretario. Luit daŭre kunportas librojn. Dum la jarkunveno venis pli da homoj ol kutime, do estis sufiĉe da intereso por la libroj. Ineke menciis ke la studsemajnfino estis granda sukceso. Venis 47 personoj kiuj estis ege entuziasmaj. La instruistino Françoise Pellegrin, el Bruselo, parolis dum la tuta semajnfino nur Esperanton. Ŝi eĉ ne volis respondi demandojn en la nederlanda aŭ en la franca. Ni do ne scias kiu estas ŝia gepatra lingvo, la nederlanda, la franca, aŭ eble Esperanto.

30 marto 2017


Korine Cheizoo (el Zoetermeer) estis nia gasto. Ni ĝuis agrablan vesperon!

Filozofi-umado estas vorto kiun ŝi elpensis por indiki ke temas pri interbabila laborgrupeto por ĉiuj, de ĉiuj aĝoj, devenoj, edukado k.s. Ne temas pri tre serioza okupo de filozofoj. La partoprenantoj parolas pri aforismoj kaj spritaj eldiraĵoj de famuloj kaj malpli konataj homoj. Tiuj aforismoj kaj eldiraĵoj troviĝas sur kartoj kun demandoj por stimuli la diskutadon.

Korine gvidas la interparolojn inter la partoprenantoj.

Labormaniero: partoprenanto elektas diskutkarton, laŭtlegas, respondas aŭ dividas pripensojn. Poste aliaj reagos k.t.p.

La celo estas interŝanĝi opiniojn kaj pripensojn, kaj tiele leĝere filozofii, filozofiece interbabili pri certaj temoj ekde propraj spertoj kaj pensoj, rilate al la vivo ĝenerale, vivkonceptoj, praktika kaj spirita konvinkoj, k.s.



13 aprilo 2017

Protokolo de la klubkunveno de la 13a de aprilo 2017

Ĉeestis: Wil, Ineke, Nelly, Johan, Richard, Andries kaj Luit.

Ineke atentigas nin pri artikolo en Interreto <http://zamenhof.life/nl/> okaze de la centa memortago de la morto de Ludoviko Zamenhof (la 14an de aprilo 2017). Ineke kunportis kopion de artikolo kiu hodiaŭ aperis en Dagblad van het Kennemerland. La titolo de la artikolo estas “100e sterfdag Zamenhof: waslijncursus Esperanto.” Ankaŭ en la Twentsche Courant Tubantia de la 13-a de aprilo estas artikolo pri Esperanto. Estas amuza artikolo pri i.a. la naŭ stratnamtabuloj en la Dr. Zamenhoflaan en Enschede.

La sciigoj kaj la ortografio sur la tabuloj estas malsamaj kaj kelkfoje malĝustaj.

La artikolo estas en interreto:

<http://www.stad-en-regio.nl/taal-zonder-grenzen/>



Andries partoprenos la 10-an de junio KER-ekzamenon B-2. Por vere okazigi la ekzamenon, partoprenu minimume kvin personoj.

Ineke jam kelkfoje parolis pri sia avo. Nun ŝi kunportis foton de li kaj lia Esperanto-diplomo el 1914, kun la subskribo de s-ro Hendrik Jan Bulthuis.

La 5-an de majo ni, okaze de la liberiĝ-festivalo, denove havos budon en la urba parko.

14 septembro 2017

Al la klubo venis gasto el Francio: Alain. Li estis mia gasto dum du tagoj. Li petis tranokton per Pasporta Servo. Ĉi-somere mi jam gastigis David, baskon el Bruselo kaj fine de oktobro 2017

venos Aleks kun tri infanoj.

Alain kaj mi vizitis Noordpolderzijl, la plej nordan parton de provinco Groningen. Ni lunĉis en Eenrum kaj gustumis la faman mustardan supon.

Alain kaj mi frue alvenis al la klubejo, ĉar mi devis malfermi la pordon kaj pretigi la kafon kaj teon. Sekvis agrabla vespero. Alain havas kontakton kun instruistinoj, al kiuj li instruas Esperanton. Alain aŭskultigis al ni la himnon 'La Espero', sed kun nova melodio.



• Alain (supre-dekstre)

Richard parolis pri siaj ferioj en Düsseldorf, Johan biciklis, ŝvitbanis sin en ŝauno kaj riparis terason. Wil rakontis pri peto el Afriko. Augustin el Ruando deziris korespondi kun infanoj de lernejo. Wil tuj transdonis la peton al Alain. Nelly rakontis ke ŝi trankvile restis hejme. Andries renkontis Alain en Slovakio kaj dum la prelego en Amsterdamo de Ulrich Lins pri lia nova libro 'La danĝera lingvo'. Mi rakontis pri la studosemajnfino kaj pri la Zamenhof-festo en Lunteren. Kiu iros tien? Kutime ni aranĝas nian propran Zamenhof-tagon en decembro. Ineke

proponis fari ĝin dum iu sabatpost-tagmezo. Tiam eble pli da membroj povos veni.

Ineke

28 septembro 2017

Ĉi tiun vesperon ĉeestis Richard, Ineke, Andries, Smaranda, Johan, Nelly, Luit kaj Wil.

La malferma vespero estos ĉi tiun jaron en la 26-a de oktobro. Ĉar la anonco en Dagblad van het Noorden la lastan jaron ne sukcesis (neniu aperis), ni decidis ne elspezi monon por nova anonco.

Zamenhof-tago estos prokrasita ĝis sabaton posttagmeze en la 16-a de decembro je la dua. Normale ni festas la naskiĝtagon de Zamenhof vespere, kaj tiam, ĉiu kunportas iun manĝaĵon. Ni trinkos teon kaj se ĉiu kunportos iun dolĉaĵon aŭ saletan bongustaĵon, ni havos 'high tea'. Ni esperas ke multaj membroj vizitos tiun tagon.

Ineke ordigas sian arkivon. Ĉion, kio estas utila ŝi donos al Esperanto Nederland. Ans Bakker helpos Ineke precizigi kio utilas kaj kio ne. Ans ankaŭ vizitos nian kunvenon en la 23-a de novembro. Ĉar ŝi volas la saman vesperon revojaĝi al Amsterdamo, la kunveno komenciĝos je 19:15.

Ineke kaj Andries ricevis retmesaĝojn en Esperanto en kiuj oni petas sendi monon. Ankaŭ Augustin, kiu antaŭe kontaktis Wil por korespondi evidente volas monon.

Andries, Ineke kaj Smaranda entuziasme rakontis pri la 'app' Amikumu.

Esperantistoj kiuj aliĝis, povas vidi ĉu estas aliaj esperantistoj proksime. Oni povas i.a. sendi al tiuj mesaĝon por renkonti unu la alian. Jam kelkajn semajnojn Ineke miras ke estas en Groningen du esperantistoj, kiujn ŝi ne konas.

12 oktobro 2017

Protokolo de la klubkunveno de la 12-a de oktobro 2017

Ĉeestantoj: Wil, Ineke, Nelly, Johan, Richard kaj Luit

Ineke sciigis al ni pri la grava akcidento de sia nevo. Tiu nevo falis kun sia motorciklo dum motorcikla terenveturado kaj la falo kaŭzis transversan spinlezon.

En 1978 Ineke ĝuis trimonatan nepagitan forpermeson. Dum ses semajnoj ŝi studis en Parizo la francan lingvon. Ŝi ankaŭ veturis al kelkaj aliaj eksterlandaj destinoj. En Parizo ŝi i.a. renkontis la nederlandaninon Tineke kaj tiu virino estos unu el la partoprenantoj de la venonta studosemajnfino en la Naturamika domo Krikkenhaar en Bornerbroek proksime al Almelo.

Dum iom da tempo ni babilas pri kelkaj malagrablaj okazintaĵoj dise en la mondo. Ni demandas nin "Ĉu okazis

ankaŭ io bona?” Post longdaŭra interkonsiliĝo nia lando finfine havos novan registaron. Eble tio estas bona novaĵo. Luit sciigas ke oni povas aboni al senpaga retroŝta mesaĝletero en kiu estas prezentitaj nur bonaj novaĵoj: Het Nieuws van de vooruitgang:

<http://hetnieuwsvandevooruitgang.nl>

Wil raportas pri la korespondpeto de Senegalano. Ŝi transdonis la korespondpeton al du interesiĝantoj. Unu el ili post iom da pripensado retiriĝis. En la dua mesaĝo la Senegalano petis pri monhelpo. Oni decidu mem pri eventuala helpo.

En 2018 estas la centa naskiĝtago de la verkisto Peter van der Velde. Tiu verkis i.a. mallongajn rakontojn kaj poemojn en la dialekto de la provinco Drente. Li mortis en 2004. Pro siaj meritoj por la regiona kulturo li fariĝis honara civitano de la vilaĝo Roden. La komunumo Noordenveld (Norg, Peize kaj Roden) rememoros en 2018 s-ron Van der Velde okaze de lia centa naskiĝtago. En 1937 li sukcese partoprenis en la ekzamenoj Esperanto A kaj B. Oni demandis Johan ĉu eblas traduki unu el liaj tekstoj en Esperanton. Ni opinias ke estas bonvena tasko por ni. Johan petos de la organizantoj sendi tekstojn de poemoj kaj mallongaj rakontoj.

Ineke raportas pri la Drongo-lingvo-

festivalo kiu okazis la lastan semajnfino de septembro en Utreĥto. Ĉi tiuj fojoj estis rezervita por Esperanto Nederland nur unu malgranda tablo (sen seĝoj), duone kaŝita malantaŭ kolono. La festivalo allogis multajn junulojn.

Ineke sciigas ke la aplikaĵo “Amikumu” sciigas ke je malgranda distanco troviĝas 5 aŭ 6 “esperantistoj” pri kiuj ni scias nenion. Ineke sendos al ili inviton al la Malferma vespero.

Johan prizorgos preskomunikon.



• *Amikumu por Android*

Luit raportas pri la malfacila situacio de Joseph (en Pollando) kaj ties edzino Neema el la Demokrata Respubliko Kongo, kiu provizore loĝas en Tanzanio kaj esperas ke ŝi dank'al la studenta

permesilo je la pola ambasadorejo en Nairobi (Kenjo) sukcesos ekhavi vizon por veturi al Pollando.

9 novembro 2017

La kunveno de la naŭa de novembro La naŭan de novembro ni decidis pri la dato de nia Zamenhofa festo. Ni preferus kunveni sabaton la 16-an de decembro, do tuj post la naskiĝdato de Zamenhof. Sed tiam jam okazos en nia kunvenejo kristnaska festo . Ni do decidis ke la Zamenhofa festo okazos la 9-an de decembro, kaj la kutiman klubkunvenon de la 7-a ni nuligis.

La pasintan fojon Wil demandis pri la uzado de la angla lingvo en nederlandaj lernejoj. Ŝajne Japke-d de NRC Next aŭdis ŝin. En artikolo en NRC Next de la 7-a de novembro Japke-d demandis Leon Jansen, 'manager marketing performance & expertise' ĉe asekuristo Aegon, ekspliko pri la anglaj vortoj en nederlandlingva anonco. Vi povas legi la artikolon rete je

<http://goo.gl/bXojtX>.

Por la unua fojo dum jaroj Johan vizitis doktoriĝan paroladon de amiko. En antaŭaj jaroj la doktoriĝonto parolis la nederlandan. La nederlandaj esprimoj kiel "waarde opponent" estas la oficialaj vortoj uzataj dum tiaj okazaĵoj. La anglaj tradukoj estis preskaŭ parodiaj, kaj la aŭskultantoj vere ridetis pro tio.

Je <http://goo.gl/WVvMGP3> vi trovas arti-

kolon de NRC pri la angla lingvo en universitato. Ankaŭ tiu artikolo diras ke la etoso fariĝas ridema.

Ĉu vi jam scias pri Amikumu? Ĝi estas programo por via telefono per kiu vi povas scii kiuj esperantistoj estas proksimaj. Per Amikumu Ineke remarkis ke estas esperantistoj apud Groningen, kiujn ni ankoraŭ ne konas. Ili ricevis inviton al la malferma vespero kaj ili recipos inviton al la Zamenhofa festo. En la kunvenejo "Krikkenhaar" apud Almelo okazis la pasintan kurssemajnfino de Esperanto Nederland. La kunvenejo tre taŭgas, ĉar ĝi havas kvar instru-ĉambrojn. En aliaj kunvenejoj estas nur unu granda ĉambro, kial la instruistoj en unu angulo ĝenas la lernantojn en alia angulo. Ineke do tuj decidis ke la sekva kurssemajnfino denove okazos en Krikkenhaar. Jam notu en via agendo: 16, 17 kaj 18-a de marto 2018: kurssemajnfino en Krikkenhaar.

En Leeuwarden estis bronza busto de Zamenhof, sed ĝi estas ŝtelita. La busto ne plu estas sur la piedestalo.

'Struikelblokjes' estas malnova lernolibro kun vortoj kiuj estas malfacile tradukeblaj el la nederlanda. Libro kun simila celo aperis antaŭ nelonge:

"Konfuziloj: vortoj kiuj faras nian lingvon malfacila." Andries kunportis la libron. Ĝi estas multe pli amuza ol la malnova lernolibro: je ĉiu paĝo estas bildo de du aŭ tri vortoj kun ekspliko.

Ekzemple drinki - trinki: drinkemulo kaj

trinki tason da teo.



drinki

trinki ebrigaĵon por plezuro aŭ memforgeso aŭ ceremonie ktp.



trinki

preni en la buŝon kaj gluti (likvon)

www.edukado.net

La libro haveblas je la retejo de la aŭtoro Przemysław Wierzbowski:

<http://espero.sk>.

Ĉe la fotoalbumoj de edukado.net

<http://edukado.net/biblioteko/>

fotoj?al=26

vi povas trovi similajn ĝenajn vortparojn, plejmulte de Przemysław.

Immanuel Kant

Kiam Wil van Ganswijk vizitis Tinie Bulk, la plej aĝan membrinon de nia klubo, tiu montris al ŝi malgrandan artikoleon el malnova gazeto. Estis legebla en ĝi sciigoj pri Immanuel Kant, germana filosofo, kiu naskiĝis en 1724 en Koningsbergen kaj poste vivis en Kalinigrado. Dum lia vivo estis daŭre potencbatalo inter polaj kaj germanaj imperiistoj. Kant ekpensis pro tio pri unu mondordo kaj estis konsiderata kiel filozofa inspiranto de Karl Marx kaj Friedrich Engels. La artikoleto pensigis

Tinie pri Zamenhof. Tinie, kiu fartas sufiĉe bone, petis de mi saluti vin ĉiujn nome de ŝi.

Kurso

Atingis min la 9-an de septembro ret-mesaĝo de sinjorino kiu petis helpon ĉe sia studado de Esperanto per la interreta kurso. Mi invitis ŝin viziti min por preparoli ŝian peton. Ŝia reago estis ke tio estos malfacila afero, ĉar ŝi loĝas en Hungario! Mi havas Esperanto-amikojn en Budapeŝto. Eble tiuj pretos helpi ŝin. Sed povas esti ke ŝi loĝas en tute alia parto de Hungario. Ni vidos kio okazos kaj atendos ŝian reagon.

Uitmarkt

La 9-an de septembro okazis "Uitmarkt" en la Rivierenhof kvartalo en Groningen. "Uitmarkt" estas informkunesto en kiu oni montras diversajn aktivaĵojn, kiujn oni povos partopreni dum la venontaj monatoj. Montriĝis ke estis ankaŭ por mi ebleco montri ion pri Esperanto. Tablo estis rezervita por mi dekstre de tablo kun naturproduktoj, kiel flavaj kukurboj, junaj legomplantetoj, filibetoj kies folioj estas tre maldikaj kaj kies petioloj similas tiuj de rabarbo. Maldekstre de mi estis tablo kun informoj pri la Immanuel-preĝejo kaj kontraŭ mi oni informis pri parolinstruo. Ĥoro de maljunuloj prezentis sin kante.

Estis sufiĉe da intereso por tio kion mi montris. Estis junuloj kiuj ĝis tiam neniam ion aŭdis pri Esperanto. Sinjoro rakontis ke li, kiam li estis knabo, dum iom da tempo estis membro de mia Esperanto-junulgrupo. Ho ve ne enskribiĝis novaj kursanoj, sed intereso estis certe vekita. Se vi havos la eblon, eĉ senkoste propagandi Esperanton, ne hezitu kaj uzu la ŝancon!



kaj klaĉoj pri Esperanto kaj esperantistoj en la nordo de Nederlando. Ĉu vi vizitis kongreson? Ĉu vi renkontis esperantistojn? Skribu pri tio, por ke ni povu eldoni klubrevuon trifoje en jaro. Ĉu vi volas ensendi artikolon? Konsideru la jenon: Uzu supersignojn (ĉ ĥ ĵ ĝ ŝ ŭ) anstataŭ la x- aŭ h-sistemon kaj ne aranĝu la tekston per grasaj aŭ kursivaj literoj aŭ aliaj aranĝaĵoj. Uzu por komenci novan alineon nur la enigan klavon. Konservu la dosieron kiel .txt (do ne kiel .doc, .docx, .odt) kaj sendu ĝin kiel kunsendaĵon en retpoŝte al la.verda.stelo@xs4all.nl. Se vi ne havas Interreton vi kompreneble povas sendi vian artikolon per normala poŝto.

Petoj

de la kasisto

Ĉu vi ne forgesas pagi vian kotizon? Ankoraŭ ne ĉiu el vi jam pagis. Peti monon estas nuntempe mia ĉef-okupo kiel kasisto kaj tio ne devus esti. Sur paĝo du vi trovas ĉion, kion vi devas

scii por pagi vian kotizon.

de la redakcio

Fine nova eldono de La Verda Stelo. Estis multe da peno plenumi la revuon. Pro tio ni petas vian helpon por prizorgi la enhavon. Ni interesiĝas pri novaĵoj

vd Velde

2018 Peter van der Velde-jaro

En la komunumo Noordenveld (Roden) la biblioteko organizas la jaron de Peter van der Velde. 2018 estas lia 100-a naskiĝjaro. Peter van der Velde estis konata pro siaj mallongaj rakontoj, poemoj, kabaredotekstoj kaj kantetoj. Li havis grandan

signifon por la Drenta lingvo kaj kulturo.

En 1937 Peter sukcesis akiri la

diplomojn de Esperanto A kaj B kaj en 1965 la diplomon Esperanto L.O. Li ankaŭ korespondis dum pli ol 50 jaroj kun presisto en Danlando.

En 1949 li vizitis la SAT-kongreson en Parizo (maldekstre sur la foto).



Laŭ peto de la biblioteko ni tradukis kvar poemojn el la Drenta dialekto en Esperanton. Unu el ĉi tiuj poemoj ni recitis la 3-an de

februaro dum la malfermo de la Peter van der Velde-jaro. La programo de la malfermo estas:


- Komenco je 15:30
- Muziko je enveno
- Malferma vorto de Abel Darwinkel.
- Recito de poemo de Esperanto Noord-Nederland.
- Recito 'Braand' de Willem van der Velde.
- Recito de poemo de Alke van der Velde.
- Prezento de la planoj por la venonta jaro.
- Malfermo de la Peter van der Velde-ejo.
- Fermo kun trinkado ĝis la 18-a horo.

Nekrologo

Jelly Westerhof-Baron

20-6-1943 – 20-10-2017

Antaŭ multaj jaroj Jelly fariĝis membro de la Esperanto-klubo en Frislando kaj poste en Nord-Nederlando. En 1990 ŝi fariĝis membro de la tutlanda asocio Esperanto Nederland. Ŝi plurfoje partoprenis en kongresoj kaj aktivaĵoj en Nord-Nederlando. Mi skribis kondoleancan karton al ŝia familio. Samtempe mi petis foton pri ŝi. Unu el la infanoj sendis



belan foton, dirante ke ŝia patrino certe aprezus la aperon de foto de ŝi en nia gazeto kaj ŝi ja varme simpatias kun la lingvo Esperanto. Tiel ŝi trapasis plurajn agrablajn kaj inspirajn horojn. La kono de Esperanto riĉigis ŝian vivon. Ineke Emmelkamp

AFZENDER / SENDINTO:

ESPERANTO NOORD-NEDERLAND

Castorstraat 360

9742 BZ Groningen



ESPERANTO - taal zonder grenzen